



# AMERIKA



# ESPERANTISTO



M. PARDOVIAN

**October**

**1928**

## CONTENTS

	Page
Club Directory .....	2
Esperanto—Kial kaj Kiel .....	3
Los Angeles Club Festo .....	6
Simplicity of Esperanto .....	6
Dr. Alfred N. Goldsmith Speaks .....	7
Book Review .....	7
Who Wrote These? .....	8
Dr. Wendell's Book in Italian .....	8
A Short Course in Esperanto .....	9
Book Announcements .....	15-16

Price 10 cents

Per year \$1.00

# THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, INC.

A propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Classes of membership: 1. Life members \$100. 2. Sustaining members \$10. 3. Contributing members \$3.00. 4. Regular members \$2.00. These four classes include Amerika Esperantisto. 5. Regular members without Amerika Esperantisto \$1.00.

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Each group is allowed 4 lines free counting the name of the city and state as one line, thus allowing for the announcement proper three lines free. Each line in excess of four will be charged for at the rate of 5 cents a line per issue or 50 cents per year if paid in advance. We desire to keep this directory corrected up to date and will appreciate your assistance.

### JERSEY CITY, NEW JERSEY

Esperanto Eduka Klubo  
578 Jersey Ave., Jersey City, New Jersey.  
Miss Sophie Schwartz, Sec. Classes for children every Wed. from 6.30 to 8; for adults from 9 to 9.30; Mrs. Julia Goldzier instructor. Barco every 2nd Saturday of the month.

### BALTIMORE, MD.

La Esperanto Rondeto, Adreso: 705 Winston Ave., Govans. Hy. S. Randall, Sek.

### BERKELEY, CALIF.

Berkeleja Esperanto Rondo.—Hilda F. Mills, Secy., 18 Northampton Ave., Berkeley, Calif. Meets Saturdays 7.30 P. M., Meeting House of Society of Friends.

### SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Rooms 309-311 de Young Building, San Francisco. Miss L. J. Marshall, Sec.

### DENVER, COLORADO

Denver Esperanto Society meets Wednesday at 8.00 P. M., Room 2, 1310 Welton Street. W. A. Buchheim, Sec., 1135 Race St.

### ST. PETERSBURG, FLORIDA

Amikeco Rondo meets Tuesdays, 4:00 P.M., Fridays, 8:00 P.M. E. E. Owen-Flint, Sec. 821 Hyde St.

### CHICAGO, ILLS.

La Gradata No. 1 meets at 1500 Cullerton Ave. Vac. Popela, Sec., 1657 W. 19th St. La Gradata No. 2 meets at 365 W. Madison St. F-ino L. M. Stanton, Sec. La Gradata No. 3 meets at Ridgeland & 26th Place. John Knotek, 2614 S. Kenilworth Ave., Berwyn, Ill. Konsilantaro meets at 365 W. Madison St. Sec. F-ino M. Simonek, 1500 Cullerton Ave.

### ROCKFORD, ILLS.

Amerika Esperanto-Instituto, 602 7th St. Kunvenoĝ la unuan kaj trian dimacon je la 10a horo.

### TOPEKA, KANSAS

Topeka, Kansas Esperanto Association. Rev. J. H. Fazel, World Delegate, Prez. Capt. Geo P. Morehouse. Vice-Prez. Mr. Warren Davis. Sek-ino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St.

### WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

### LOS ANGELES, CALIFORNIA

The Esperanto Club of Los Angeles. Club meeting, 2nd Wednesday each month, Lecture Room, Public Library. Pres., S-ro Joseph R. Sherer, 612 S. Spring Street; Secy., S-ino Mabel G. Smith, 3116 San Marino St.

### BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

### WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto Asocio, Telephone Miss Leavitt, Main 6640, between 4 and 6 P.M., or address Mr. John A. Sheil, Delegate U. E. A. 506 Sixth Street N. E., Phone Lincoln 10231 between 4 and 6 P.M.

### DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily.

### MINNEAPOLIS-ST. PAUL

Twin City Esperanto Club, meets for dinner and program 6:30 P.M. 1st Tuesday in each month at Minn. Union Bldg., University of Minnesota. Mrs. Helen W. Frink, Secretary, 1536 La Salle Ave., Minneapolis, Minn.

### NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Catherine M. Healy, St. Paul's Place, Brooklyn. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6:45 P. M., at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Avenue.

### WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

### CLEVELAND, OHIO

Cleveland Esperanto Society, Main Public Library. Meets at 7.30 P. M. first and third Wednesdays of each month. S. Kosminski, Sek., 3406 Mayer Ave.

### PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Secy., West Phila. High School for Boys. Monthly meeting for business every fourth Friday at Y. W. C. A., 18th and Arch Sts., 8:15 P. M. Social and class meetings on same hour and place on other Fridays. Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Deligitado de U. E. A.). Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

### MILWAUKEE, WISCONSIN

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M. Esperanto Club of Milwaukee, J. R. Williams, Pres., 718 Buffum Street; S. Lilwin, Sect., 671—14th Avenue.

### MADISON, WISCONSIN

Esperanto Office, 119 W. Main Street.

# Amerika Esperantisto

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Post Office at St. Paul, Minn.,  
under the Act of March 3, 1879.

Published on the 5th day of each month by  
THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA  
1001 Commerce Bldg. St. Paul, Minn.

---

One Dollar a Year

---

PUBLISHERS E. A. N. A.

Editor -----CHAS. W. BARNES  
Assistant Editor -----JOS. J. BURITA  
Office of Publication...1001 Commerce Bldg., St. Paul, Minn.

---

Vol. 40

OCTOBER, 1928

No. 5

---

## ESPERANTO—KIAL KAJ KIEL

de

Reuben Algot Tanquist

(Resumo de tezo, kiun verkis la aŭtoro por la akiro de filozofidoktorecon ĉe la Universitato de Minesoto, en la jaro 1927.)

Kiam ajn komenciĝas nova movado estas tute nature, ke homoj faru pri ĝi la jenajn demandojn: "Kial ĝi komenciĝis?" "Kial homoj interesiĝas pri ĝi?" "Kia estas ĝia celo?" "Kiamaniere oni propagandas ĝin?" Tiujn demandojn oni rajtas fari, kaj al ili oni rajtas postuli respondojn antaŭ ol la gvidantoj de la movado rajtas peti ies subtenon.

En lasttempa studo, farita de la aŭtoro de tiu ĉi artikolo ĉe la Universitato de Minesoto, ĉi tiuj demandoj rilatantaj al Esperanto estis responditaj de 750 individuoj, kiuj interesiĝis pri Esperanto.\* Iliaj opinioj havigis per demando sendita al Esperantistoj en Nord-Ameriko, Granda Britujo, Kontinenta Eŭropo, kaj Aŭstralio. La demando enhavis demandojn pri la sekso, aĝo, eduko kaj okupo de la informanto kaj la jaro de lia esperantiĝo. Sube en resumita formo estas la respondoj al ĉi tiuj demandoj. Ili servos kiel bazo por la diskuto, kiu pli poste sekvos.

### Informantoj klasitaj laŭ Geografiaj Grupoj

Amerika 188: Brita 232: Eŭropa 335

La Amerika grupo ampleksas Usonon kaj Kanadon; la Brita grupo, Grandan Britujon kaj Aŭstralion, kaj la Kontinenta Eŭropa grupo ampleksas ĉirkaŭ dudek landojn, kvankam la plimulto de la respondoj el ĉi tiu grupo venis el Germanujo, Aŭstrujo kaj Hungarujo.

\* Ĉirkaŭ 300 respondoj venis al la Universitato post la apero de la tezo. L. W.

### Proporcio de la Seksoj

Viroj 66% . . . . . Virinoj 34%.

### Informantoj klasitaj laŭ aĝ-grupoj

Malpli ol 20 jaraj . . . . .	25%
20-29 . . . . .	31%
30-39 . . . . .	22%
40 kaj pli . . . . .	22%

### Informantoj klasitaj laŭ periodoj da jaroj en kiuj ili komencis studi Esperanton.

Antaŭ 1910 . . . . .	18%
1910-1919 . . . . .	17%
1919-1927 . . . . .	64%

### Informantoj klasitaj laŭ specoj de lernejoj en kiuj ili laste studis.

Elementa lernejo . . . . .	30%
Supera lernejo . . . . .	39%
Universitato . . . . .	16%
Komerca lernejo . . . . .	4%
Lernejo por Instruistoj . . . . .	4%
Neklasitaj . . . . .	7%

**Informantoj klasitaj laŭ okupo en la tempo kiam ili eklernis Esp.**

Nemetiistoj	3%
Duon-metiistoj	6%
Metiistoj	11%
Duon-profesiaj	24%
Profesiaj	26%
Studentoj	18%
Dom-mastrinoj kaj aliaj ĉeheimaj virinoj	10%
Terkulturistoj	1%
Neklasitaj	1%

**La Demandoj 'Kial' kaj 'Kiel' Respondataj**

La demando ankaŭ enhavis la jenajn demandojn: "Kial vi interesiĝis, pri Esperanto?", "Kiel vi interesiĝis?", kaj "Kiamaniere vi lernis Esperanton?" Ĉi tiu artikolo temas ĉefe pri la respondoj al la supraj demandoj.

Diversaj kialoj pro la interesiĝo pri Esperanto montriĝis en la respondoj, ekzemple internaciaj rilatoj, vojaĝo, lingvistiko, korespondado, kaj aliaj. Sub Internaciaj Rilatoj oni enkalkulas pacon, internaciismon, kaj la fratecon de l'homaro.

**Kialoj por Interesiĝo pri Esperanto**

Internaciaj rilatoj	29%
Lingvistiko	24%
Korespondado	14%
Vojaĝo	13%
Politika & Religia Propagando	8%
Distreco	4%
Kolektado	3%
Radio	2%
Neklasitaj	3%

La supraj respondoj ilustras, iomgrade, du diversajn principojn: la teorion pri individua diferenceco, kaj la teorion pri la unuformeco de la homa naturo. Individua diferenceco montriĝas per la diversaj valoroj, kiujn la informantoj vidas en internacia lingvo. Jen sola institucio servas diversajn bezonojn en diversaj individuoj pro varieteco en specifaj interesoj. La unuformeco de la homa naturo, malgraŭ geografiaj landlimoj, estas ilustrita per komparo de la tri geografiaj grupoj. Laŭ ordo de graveco la kialoj sin montras proksimume samaj en la tri grupoj.

La perojn per kiuj la informantoj ekinteresiĝis pri Esperanto oni povas dividi en du grupojn: senpera kontakto kaj pera kontakto. La senpera kontakt-stimulo aludas al informoj ricevataj per vizaĝo kontraŭ vizaĝo kontaktoj de amikoj, parencoj, kunlaborantoj, instruistoj, kaj Esperanto-propagandaj kunvenoj. La pera kontaktstimulo aludas al informoj ricevataj el tagjurnaloj kaj gazetoj, el Esperant-propaganda literaturo, afiŝoj, kaj radio-paroladoj. La jena tabelo liveras la relativan gravecon de ĉiu speco de stimulo.

**Peroj per kiuj la Informantoj Ekinteresiĝis pri Esperanto Klasitaj laŭ Kontakt-grupoj.**

<b>Senpera Kontakto</b>	<b>Pera Kontakto</b>
Viroj 58% . . . . . Virinoj 73%	Viroj 42% . . . . . Virinoj 27%

Ĉi tiu tabelo montras, ke la senpera kontakt-metodo multe pli efikas ol la pera kontakt-metodo, precipe ĉe la virinoj. La studo ankaŭ montras, ke la personoj kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto antaŭ ol ili havis dudek jarojn estis influataj pli per senperaj kontaktoj ol personoj havantaj pli ol dudek jarojn. Ju pli aĝaj la informantoj estis des pli ili estis influataj per presitaj artikoloj.

La lasta demando rilatas al la metodo per kiu la informantoj lernis Esperanton. Nur en la lastaj jaroj Esperanto eniris en la lernejojn. Pro tio la plimulto de la Esperantistoj devis lerni la lingvon ekster lernejo. Dek du procentoj de la informantoj lernis la lingvon en iu lernejo.\*

**Informantoj Klasitaj laŭ Metodo per kiu Ili Lernis Esperanton.**

Memstudado	32%
Privata Klaso	30%
Esperanto-grupo	24%
Supera lernejo	6%
Vesper-lernejo	3%
Radio Paroladoj	2%
Elementa lernejo	2%
Universitato	1%
Neklasitaj	2%

### Konkludo

Se la intereso pri Esperanto daŭre kreskas sendube la nombro da lernejoj en kiuj oni instruas la lingvon pliiĝos. Estas tute nature, ke la lernejestroj de nia lando kaj de aliaj landoj hezitas enlasi en siajn kursojn kompare novan temon antaŭ ol ĝia valoro estas pli vaste montrita, aŭ antaŭ ol ĝia bezono estas pli forte sentata. Pro la konstante kreskanta interdependeco de la nacioj de la mondo la bezono por komuna interkomprenigilo pli kaj pli kreskas. Diversaj komercaj organizaĵoj, kiuj internacie negocas, subtenas la movadon por la alprenado de internacia helpa lingvo; ĉar la disvastiĝo de tia lingvo multe helpus internacian komercon.

Kelkaj asocioj por la progreso de la Sciencoj subtenas tian movadon. Kelka ŝtatisoj, ankaŭ, vidas en la universala akcepto de helpa lingvo potencon rimedon por la efika funkciado de internaciaj kongresoj.

Esperanto, laŭ ĝiaj subtenantoj, plenumas la postulojn de internacia helpa lingvo. Ĝi estas ricevinta la subtenon de la grupoj supre menciitaj, kiel ankaŭ de aliaj grupoj. Ĝia rimarkinda simpleco kaj ĝia facila lernebleco estas gravaj punktoj por Esperanto. La fakto, ke Esperanto ne estas bazita sur unu sola nacia lingvo malhelpas la eniron de naciaj jaluzoj kiel obstrukcoj kontraŭ ĝia disvastigo. Se la Esperanto movado daŭre kreskas, la diversaj faktoroj, kiuj nun influas ĝian kreskadon, ne necese restos identaj kun tiuj montrataj en ĉi tiu verko. Ekzemple, se venos iam la tempo kiam Esperanto universale enpenetros en la lernejojn, la nombro de ĉiu sekso eble pli egaligĝos ol ĉe la grupoj sur kiuj ĉi tiu studo estis bazita. Estas ankaŭ kredeble, ke la aĝo de la eklernantoj de Esperanto estus pli malalta ol nun, pro tio ke la plimulto de la informantoj lernis Esperanton ekster lernejoj. La klereco de estotaj Esperantistoj varius do kun la ĝenerala nivelo de edukado de la tuta loĝantaro.

Le jena studo montras vastan diversecon de okupoj ĉe la Esperantistaro. Tamen, la profesiaj kaj duon-profesiaj grupoj enkalkulas duonon de la tuto, dum la student-grupo enhavas nur 18 procentojn. Kun la ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn, estas tute nature, ke la student-grupo fine superus la aliajn laŭ graveco.

Laŭ sciigoj jam supre faritaj pri la faktoroj kiuj ekinteresis la informantojn pri Esperanto, la graveco de la senpera kontakt-stimulo variis inverse kun la aĝo de la individuo. Pro tio ke la pliiga enkonduko de Esperanto en la lernejojn rezultus en pli frua kontakto kun la lingvo, ni rajtas atendi plian gravecon de la senpera kontakt-metodo.

La aĝo de la individuo kiam li unue ekinteresiĝas pri Esperanto estos grava faktoro pri la kialo de lia interesiĝo. Oni ne rajtas atendi, ke la dek- aŭ dekkvin-jarula tiom interesiĝas pri mondpaĉo kiel la viro aŭ virino matura. Aliaj faktoroj, ankaŭ, sendube eniros, kiam la studento komencas studi la lingvon devige. Dum la infano ekmaturiĝas, tamen, li eble trovos pli gravajn kialojn por lia subteno de la movado. En jaroj estontaj la intereso pri radio sendube servos kiel pliige potenca stimulo por la disvastigo de internacia lingvo.

Kiel pero por la lernado de Esperanto la radio sendube ludos gravan rolon. En Minneapolis, Usono, ĉiusemajnaj lecionoj en Esperanto estis dissendataj radio lastan lernejjaron (1926-27) de membro de la fakultato de la Universitato de Minesoto. Tiom da intereso montriĝis, ke oni ankaŭ ĉi tiun jaron (1927-28) daŭrigos la dissendadon. Verkinto en "International Language" (Londono) por Septembro 1926 informas nin, ke preskaŭ cent radio stacioj en dudek-ok landoj uzas Esperanton.

Ĉu la Esperanto-movado daŭre kreskos ĝis ĝi kovras la mondon la estonteco montras.

Ne restas dubo, ke ekzistas forta bezono por internacia lingvo. La venontaj jardekoj eble decidus ĉu Esperanto plenumos la bezonon.

Tradukis D-ro Lehman Wendell,

Universitato de Minesoto.

---

\* Se S-ro Tanquist estus verkinta sian tezon antaŭ dudek jaroj (la jaro en kiu la tradukinto esperantiĝis), lia procento estus multe pli malalta. Ĝojiga fakto.

### ESPERANTO CLUB OF LOS ANGELES, GASTIGIS VIZITANTAĴN ESPERANTISTOĴN

La 19an de Oktobro, la Los Angeles Esperanto Klubo gastigis, je vespera festeno (bankedo), kiu okazis ĉe Windsor Tea Room, D-ro F. G. Cottrell el Washington, D. C., S-ro A. S. Vincent el San Francisco, S-ino Hilda F. Mills kaj S-ro A. F. Postnikov, ambaŭ el Berkeley, Kalifornio.

D-ro Cottrell, bone konata Esperantisto, dum multaj jaroj laboras ĉe la departemento de Scienca Serĉado. Tial, lia laboro por Esperanto estas ĉefe inter scienculoj kaj kleruloj.

S-ro Vincent estas ĉef-deligito de U. E. A. en okcidenta Usono kaj ankaŭ estas Frezidanto de la Esperanto Asocio de Kalifornio.

S-ro Postnikov kaj S-ino Mills ankaŭ estas lertaj Esperantistoj, kiuj multe laboras por Esperanto.

Nia Klubo fieras pri la okazo gastigi ĉitujn distingindajn Esperantistojn.

### SIMPLICITY OF ESPERANTO

Esperanto does not aim to displace other existing languages, but merely to serve as a simple, practical, easily learned, auxiliary language, one that can be learned by any person of ordinary intelligence in a few months' study.

There are three reasons for its amazing simplicity: First, the minimum of grammar—only sixteen rules and no exceptions to these rules. Second, a vocabulary of very small dimensions, three fourths of which are recognized as found in English. Third, a system of word building by means of prefixes and suffixes which, from a small number of roots, makes possible an enormous number of combinations capable of expressing accurately the most minute shades of meaning. By the elimination of practically all of the difficulties which make the learning of foreign languages difficult, one can almost immediately commence to correspond and use Esperanto for whatever purpose he wishes. Some use it for stamp collecting and for the collection of all sorts of other things. The working man, the policeman, the professional man, and the business man are all using it for studying conditions in various countries and for obtaining first hand information from their confreres. As a language for use in International conventions and congresses, Esperanto has had some remarkable successes. This is partly due to the fact that it is less easily misunderstood and that it does not arouse national prejudices or commercial jealousies. We do not realize in this country the difficulties which confront peoples in other parts of the world, nor do we realize the difficulties of learning English grammar, vocabulary, spelling and pronunciation.

The careful study of written and spoken Esperanto will show that in comparison with the important languages of Europe it possesses in higher degree most of their individual advantages and few or none of their disadvantages, as a vehicle of the expression of thought. When spoken, as for example over the radio it is more clearly understood than the German and it does not have that uncertainty which makes English hard to catch if not carefully, clearly, and slowly spoken, and French, the despair of all foreigners even when clearly pronounced. Esperanto is more readily understood when written than French or Italian and is grammatically far more simple than English with so many words that may be nouns or verbs or adjectives at different times. Its pronunciation (including of course its spelling) is more phonetically simple and regular than the German, Italian or Spanish, and in Euphony it is the equal of the Italian or Spanish for which it is often mistaken. Its expressiveness and power of accurately translating minute shades of meaning are greater than any other language owing to its complete verb forms, its very rich system of affixes and certain other grammatical expedients (as for example the adverbial participle). I do not want to fail to mention the fact that more than 5,000 books and pamphlets have already been published in Esperanto and that there are 80 or more magazines being published in Esperanto. The books include some of the best works of the world's literature. The European nations, especially the Germans, are making considerable use of Esperanto for advertising purposes, sending out catalogues, and price lists of all sorts of objects that can be sold through the mails.

I am frequently in receipt of circulars and booklets descriptive of the great European fairs and expositions.

But most of all Esperanto helps promote human brotherhood and understanding. This was the original purpose for which Dr. Zamenhof spent the years of his youth and manhood constructing this wonderfully valuable language.—Chas. H. Briggs.

## DR. ALFED N. GOLDSMITH

Chief Broadcast Engineer, Radio Corporation of America.

"So long as radio communication was essentially confined to telegraphic messages difficulties arising through language differences, though serious, were not felt by many telegraph users. Now that international radio telephonic communications have come into being and international radio broadcasting looms on the horizon, a much more serious and pressing problem has arisen.

"When persons speaking what is alleged to be the same language cannot readily communicate without some experience with each other's idioms and accent, it becomes at once obvious that persons of different nationalities and tongues are subject to a most serious handicap in their attempt to discuss matters of common interest. Furthermore, international broadcasting, which is a means of mass communication, must in great part lag in its development until an international auxiliary language becomes available.

"Those who handle and operate the telegraph circuits of the world, those who desire to telegraph or telephone over such circuits, and the people of the world who wish each to receive the broadcast messages of the other, will never find their desires fully met until an auxiliary language internationally employed breaks down the present language barriers to world understanding."

## BOOK REVIEW

GENERAL LANGUAGE COURSE.—de Helen S. Eaton. The Botolph Printing Works, Gate St., Kingsway, London, W. C. 2. 188 p. Prezo \$1.75.

La titolo de la libro donas neniam ideon pri la enhavo. Ĝi estas rakonto pri juna knabo, kiu per flugmaŝino vojaĝas ĉirkaŭ la teron kaj dumvoje vidas multajn landojn, kaj konatiĝas kun multaj diverslandaj infanoj. Dum mia libertempo mi havis la plezuron trarigardi la manuskripton kaj legante ĝin mi diris al mi, "Jen estas ankoraŭ alia rakonto en Esperanto; interesa ĝi sendube estas, sed nia Esperanto-biblioteko jam estas tro granda; plu da libroj ni ne bezonas dum kelkaj jaroj." Kelkajn monatojn poste mi ricevis ekzempleron de la nova libro kaj grandega estis mia surprizo. La libro ne estas simpla rakonto; ĝi estas unu el la plej bonaj lernolibroj, kiujn mi ĝis nun vidis.

La valoro de la libro estas duobla. Unue, la aŭtorino klarigas la gramatikon en tre simpla kaj facile komprenebla maniero, kaj pro tio la libro, kvankam verkita por knaboj kaj knabinoj, ankaŭ servos por plenaĝuloj, kies scio de gramatiko ne estas profunda. Due: ni esperantistoj ja bona scias, ke Esperanto malfermas la pordojn al aliaj lingvoj, kaj ke oni povas multe pli facile transiri de la gepatra lingvo al fremda lingvo se oni unue studis Esperanton. Ĉi tiu lernolibro sekvas tiun konatan fakton kaj klopodas liveri al la juna studento bazon por sekvonta lingvostudio. El 893 radikoj en la libro, 195 apartenas al la lingvoj latina, angla, franca kaj germana; 160 al la latina, angla kaj franca; 139 al la angla, franca kaj germana.

Oni vidas do, ke la lernolibro de F-ino Eaton liveras al la studento la fundamentajn principojn de gramatiko, kaj due instruas al li la plej komunajn radikojn de la Eŭropaj lingvoj. Krom tio, la rakonto mem estas sufiĉe interesa por teni la intereson de la studento dum la legado.

LEHMAN WENDELL

**Prince Vance'**—by E. Putnam and A. Bates; translated by H. Harris; quaint illustrations by F. Myrick; 5 x 6½, 95 pages, gold title on green cover paper.

Once upon a time there lived a boy whose name was Prince Vance, and he made a long, long journey carrying his whole family on his back. Yes, his whole family—his father, the King; his mother, the Queen; and the twelve beautiful Princesses, his sisters. It all came about this way, you see. The Blue Sorcerer had bewitched them all, and they had grown smaller and smaller—so small, indeed, that they had to live in a dolls' house for fear someone would step on them! Now the only man in the whole wide world who could change them back again was the Strawberry Sorcerer, and Prince Vance, with the doll's house on his back, set forth to find him. He met all kinds of people; good

ones and bad ones; clever ones and stupid ones; roaring giants and talking animals. There was one man too lazy to breathe—another man had to breathe for him; and a queer professor who made Prince Vance dig in the Garden for Greek roots.

Prince Vance' is a fairy story for children of all ages, and if you enjoy Alice in Wonderland and the Wizard of Oz, you should read Prince Vance'. It has some faults; for instance, an over-supply of participles. But these faults become virtues if the book is used as an exercise in translation from Esperanto into English. Boys and girls of intermediate grade could use this book with more ease than the usual reader, as it translates into English almost word for word.

(See Book Dept. for price—ED.)

—BOIZO

### WHO WROTE OR SPOKE THESE WORDS AND WHERE ARE THEY FOUND?

1. Partoj kaj Fedoj kaj Elamanoj, kaj loĝantoj en Mezopotamio. Judujo Kapadokio, Ponto kaj Azio. Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la partoj de Libio apud Kireno, kaj pasloĝantaj Romanoj, Judoj kaj prozelitoj, Kretanoj kaj Aroboj—ni aŭdas ilin paroli en **nia lingvo** la mirindaĵojn de Dio.

2. Dolĉaj l'utiloj de la malbonŝanco:  
 Simile al la bufo, veneneca,  
 Malbela Ankaŭ, tamen en la kapo  
 Ĝi portas altvaloran jeveleton:  
 Kaj jen la nia viv' liberigite  
 De vizitad' publika, trovas langojn  
 En arboj, librojn en la riveretoj,  
 Predikojn en la ŝtonoj, bonon ĉie.

3. Ja nur tio estas fasto, kiu plaĉas al Mi, se vi disŝiros la ligilojn de malpieco, disbatos la katenojn de sklaveco, liberigos la prematojn, disbatos ĉian jugon; se vi derompos vian panon por malsatulo kaj senhejmajn malriĉulojn enkondukos en vian domon; se, vidante nudulon, vi lin vestos, kaj antaŭ viaj samkarnuloj vi vin ne kaŝos. Tiam via lumo ekbrilos kiel matenruĝo, kaj via saniĝo rapide progresos; via virto iros antaŭ vi; la gloro de la Eternulo gardos vin malantaŭe.

4. "Ni estas ĉiuj pekantoj, mia bona filino" (ankoraŭ li nomis ŝin "bona;" ree larmoj fluis el ŝiaj plorantaj okuloj kaj malsekigis lian manon, kiun ŝi ekprenis kiam li etendis ĝin al ŝi en benado), "sed kiom ajn vi estas provinta peki, mi bone scias ke dum unu hela momento, aĉmenaŭ, vi estis bona kaj kun pura koro. Kiam vi staris sub la branĉoj de tiu sankta arbeto, viaj pensoj estis kristale klaraj kaj purigitaj de ĉiu malbona intenco aŭ penso. Ĉu tio ne estas vera? Rememoru viajn pensojn dum vi tie staris: ĉu ili ne estis ĉiuj ĝojaj kaj senkulpaĵ?"

The best answer with comments not exceeding 150 words will be published.

**Wendell's Sep Ridoj to Be Translated Into Italian.**—This little book of charming stories translated into Esperanto by our versatile Assistant Secretary Dr. Lehman Wendell wins such favor in Italy that it is to be translated into the Italian language. This information comes to us through the correspondence of Samideano F. R. Hall of Cannon Falls, Minn. Mr. Hall writes: "Antaŭ ne multaj semajnoj mi sendis al itala samideano, S-ro C. C. Fogliacco, Torino, Italujo, ekzempleron de via ĉarma, humorplena libreto "Sep Ridoj" kaj petis lin ke li legu "Postkartofobio." Hodiaŭ mi ricevis de li tre interesan kaj afablan poŝtkarton, per kiu li informas min, ke li intencas traduki "Postkartofobio" italen. Ŝajnis al mi ke tiu ĉi novaĵo eble estus tre interesa al vi kiel aŭtoro de tiu humorajo."

**Writings of Dr. Wendell Also Come to the Notice of the Dental Profession.**—The following letter from Dr. Alfred P. Lee, editor of *The Frater*, published by the Psi Omega Dental Fraternity, will be of interest to our readers:

"Dear Brother Wendell, A letter from Supreme Grand Master Friessel (Dr. Friessel, Dean of the Dental College, University of Pittsburgh,—Editor), tells of your many activities along literary lines, especially in Esperanto. Allow us to congratulate you on this splendid achievement. It is always refreshing to find our dental men taking interest in lines outside their professional work, especially when they make themselves authorities thereon. We have received the list of journals in which have appeared contributions of yours. Also three books on Esperanto and one on X-Ray plates. Can you not make our library a notable contribution by sending us, preferably autographed, any or all of these books and periodicals? We shall esteem it a great favor and shall make public acknowledgment as soon as received.

Wishing you success in your literary work, I am, Sincerely and fraternally yours, Alfred P. Lee.

### THE NEW FISCAL YEAR

The constitution of E. A. N. A. provides that dues are to be paid on the first of October in each year. New members who have joined since the Annual Congress at Madison are credited to October 1, 1929. The constitution provides that dues are payable from all others on the first of October. Those who have let the past year slip by without paying should include the arrears with the dues for the ensuing year. It will save Central Office much labor and expense if all will attend to this without waiting to receive notice from the Secretary.



## A SHORT COURSE IN ESPERANTO

## LECIONO UNUA

## Sec. 1. The Vowels

Esperanto is written with the Roman Alphabet as is English and most of the languages of Europe. The names of the consonants are spelled by placing the letter **o** after the consonant; as, **co**, **ĉo**, **do**, etc., while English spells them with the letter **c**; as, **be**, **de**, **pe**, etc. However, in English there are many exceptions. **Q**, **w**, **x** and **y** do not occur in Esperanto. The **y** sound is represented by **j** and the **w** by **ŭ**.

The vowels are simple, open sounds neither long nor short but of medium length.

**A** is pronounced like **a** in **arm**, **calm**, **ah**, **father**. Pronounce the following Esperanto words giving the **ah** sound to the **a**: **patro**, **frato**, **tablo**, **la**, **staras**.

**E**, like **e** in **bend**, **very**, like **a** in any, like **ai** in **said**. The sound is a little longer than English short **e** but of the same quality. Pronounce the Esperanto words: **en**, **ne**, **de**, **jen**, **bela**, **fidela**, **tre**.

The sound of English long **a** as in **made**, **late**, is represented in Esperanto by the combination **ej**. So be careful not to pronounce Esperanto **e** like English long **a**.

**I** is pronounced similar to **i** in the English word **machine**, pronounced without a slur or glide. This sound of **i** is not the same as English long **e** in words like **be**, **legal**, **sequence**, etc. In English the long **e** sound is more frequently spelled with **ee** as in **see**, **tree**, **seed**, or with **ea** as in **plea**, **read**, **mean**. This long **e** in English is not a pure vowel sound but a diphthong or gliding sound ending in a consonantal **y**. This will be readily perceived if you follow the long **e** with a syllable beginning with a vowel. See it sounds like **see yit**; **free us**, like **free yus**. It is this glide or consonantal ending that is to be omitted in pronouncing **i** in Esperanto. Practice: **filo**, **viro**, **kiam**, **kie**, (two syllables), **amiko**, **sidas**, **diras**.

**O** is like the first part of English long **o**. Pronounce the words, **hope**, **home**, **note**, **lore**, **more**. Observe that in pronouncing this sound there is a contracting and rounding of the lips as if you were going to follow it with a **w**. This is to be avoided in Esperanto. Keep the mouth in the same position throughout and you will produce a sound that may seem like broad **a** in **all**, **ball**, but it is not broad **a**, it is higher in the throat. It is the sound of **o** in **orb**, **lord**, **order**. You will have no difficulty if you start with long **o**

and do not change the position of the mouth or throat during the continuance of the sound. Practice **domo**, **homo**, **bona**, **floro**, **volo**, **oni**.

**U** is like **oo** in **boot**, **moon**, **soon** Avoid beginning it with an obscure **y** sound as occurs in the word **pure** before **u**. Pronounce the Esperanto words: **suno**, **kuras**, **ludas**, **bruna**, **apud**,

## Sec. 2. The Diphthongs

The letter **j** is combined with the vowels **a**, **e**, **o**, and **u** to form diphthongs. **Aj** is like **y** in **my**, like **uy** in **buy**, etc. Practice **kaj**, **gaja**, **krajono**, **tajloro**, **belaj**, **bonaj**, **novaj**.

**Ej** is like **ey** in **they**; practice **hejmo**, **hejtas**, **vejno**, **plej**, **bejo**, **mejlo**.

**Oj** is like **oy** in **boy**. Practice **filoj**, **patroj**, **viroj**, **bojas**, **ĝojas**, **foje**, **kojno**.

**Uj** can be produced by putting after the **u** the same little glide you have in **aj**, **ej**, and **oj**. Because our ears are not used to it we feel like we were making two syllables of it, but it is no more two syllables than is **aj**, **ej**, or **oj**. Say **toy**, and then say **tuj**. The **uj** has the same little short **i** sound at the end that **oy** has in **toy**.

**Aŭ**, like **ow** in **how**.

**Eŭ**, Pronounce the **e** contracting and rounding the lips as in **aŭ**.

## Sec. 3, the Consonants.

**C** is like **ts** in **its**, **cuts**, **bats**. **Eco** is pronounced **etso**; **celo** is pronounced **tselo**. Practice **cendo**, **cemento**, **car**, **boneco**, **beleco**, **kuneco**.

**Ĉ** is like **ch** in **church**, **chum**. Practice **ĉambro**, **ĉapo**, **ĉarma**, **ĉe**, **ĉeko**.

**G** like **g** in **go**, **gun**. Practice **ganto**, **gasto**, **genuo**, **glavo**, **regno**, **sago**.

**Ĝ** like **j** or like **g** in **gem**, **gentle**. Practice **ĝirafo**, **ĝis**, **ĝentila**, **ĝardeno**, **manĝas**, **aĝo**, **horloĝo**.

**H** like **h** in **horse**, **hat**. Practice **havas**, **helpas**, **herbo**, **haro**.

